

Numero: 305.  
Oktobro 2017.

25-a jarkolekto

# VESPERTO

## Literaturaj folioj



Redaktanto  
Apáti Kovács Béla  
Kaposvár, Béla király u. 44. HU-7400  
Telefona: 06/20/497-03-64  
Retadreso: [apatikb111@gmail.com](mailto:apatikb111@gmail.com)  
Eldonanto: KAPOŠVARA ESPERANTO-CENTRO  
Lingve kontrolis: Erzsébet Tuboly

## La estonto de ESPERANTO

Estus bone kaj laŭdirde, se Esperanto ekzistus ankaŭ post jarcentoj, eĉ ĝi fariĝus la dua gepatra lingvo de la homaro.

Mi scias, ĝi estas belega sonĝo en nia mondo. En ĉiu tago oni eltrovas ian aĵon por helpi la komunikadon.

Antaŭ nelonge mi legis, en iu lando oni fabrikis grandiozan tradukmaŝinon per kio la komunikado estos tre facila el ĉiu ekzistanta lingvo.

Vere nun „ĉi maŝino” komprenas nur la anglan, germanan kaj japanan lingvojn, sed onidire baldaŭe ĝi povos traduki iun ajn lingvojn.

Mi ne scias, ĉu en iu tago la tradukmaŝino superos la homon aŭ ĝi restos infanludilo por ĉiam.

La teknika progreso ne estas haltigebla. Tio estas en ordo, sed laŭ mi la veran homan parolon nenio povos anstataŭi.

La homaro bezonas sendependan, internacian helplingvon per kiu oni povos komprenigi sin.

Mi vidas fantazion en Esperanto. Ĝi povus fariĝi bonega ilo, kiel helplingvo sur ĉiu tereno.

Zamenhofa lingvo estas sendependa. Neniu nacian lingvon ĝi subpremis dum sia ekzisto, eĉ Esperanto fidele kaj grandioze servis la kulturon kaj lingvon de malgrandaj nacioj.

Krome ĝi estas kontraŭ neniu lingvo. Esperanto ellerneblas pli rapide, ol aliaj, naciaj lingvoj. Kompreneble ankaŭ ĝin oni devas lerni kaj poste regule ekzerci.

Ofte mi aŭdas argumentojn kontraŭ Esperanto. Mi ne komprenas la kontraŭantojn de ĉi tiu lingvo.

Ili kondutas tiel, kvazaŭ ĝi estus danĝera ilo de kio oni devas timi.


Esperanto ne deziras anstataŭi la naciajn lingvojn.

Stulta argumento, ke ĝin parolas malmultaj homoj en la mondo.

Ni ne forgesu, Esperanto estis kreita en 1887 kaj ĝi estas tute juna lingvo.

Mi rekomendas al ĉiu, kiu deziras komprenigi sin kaj volas ŝpari tempon kaj monon dum lingvolernado.

— Redaktanto —



## Eksterlande

Jes, antaŭ nelonge mi estis eksterlande. Ni veturis per aŭto. Jes per mia propra aŭto.

Ne, mi ne parolas fremdajn lingvojn. Ĉu ĝi estas necesa? Laŭ mi ne. Ĉie mi povis komprenigi min. Kial elspezi por lerni lingvojn? Verdire en la lernejo oni instruis al ni fremdan lingvon, sed ĝi ne tro interesis min. La lingvolernado estas enuiga. Anstataŭ lingvohoroj mi piedpilkis en la parko.

Ne provu konvinki min pri la neceso de la kono de iu mondlingvo!

Mi ne deziras lerni lingvojn. Se iu eksterlandano volas komuniki kun mi, li ellernu mian lingvon.

Ne ridigu min, ke la nia estas malgranda lingvo!

Vidu, en nia lando ĉiu parolas ĝin! Ĉu ne? Prave tie ĉi vivas kelkaj eksterlandanoj, sed jam ili scias iomete nian lingvon.

Kial mi parolu kun ili en iu fremda lingvo? Mi ne estas stulta.

Kiel mi komprenigis min eksterlande? Tre facile. En mia poŝo ĉiam estas tradukmaŝino kaj per ĝi mi povas traduki la necesajn vortojn kaj esprimojn.

Ne! Ĝi neniam malfunkciis. Neniu ni miskomprenis unu la alian.

Kio? Ĉu mi denove rakontu, kiel ni mendis glason da biero en Parizo?

Mi jam rakontis al vi centfoje. Bone, se vi denove volas aŭdi.

Ni trioje tri junuloj vagadis en Parizo kaj ni ege soifĝis. Ni eniris luksan drinkejon en iu bulevardo.

Mi prenis el mia poŝo la tradukmaŝinon kaj rapide mi fingrumis: „Ni petas tri glasojn da biero.” La kelnero estis miopulo kaj anstataŭ biero li portis por ni lakton.

Ni trinkis ankaŭ lakton kaj poste ni ankoraŭ mendis ankaŭ bieron. La du trinkaĵoj intermiksiĝis kaj al mi ĝi kaŭzis teruran lakson. Bedaŭrinde ĝi venis tiom rapide, ke mi ne povis atingi la necesejon.

— Ŝaŝa —



Katalin Kondra

## Ĉie rumane



Ŝoke mi legis la sekvan eventon sur iu interneta, publika paĝo. Ĝi okazis en Sikullando. Patrino kaj ŝia filo veturis per vagonaro kaj ili paroladis en gepatra lingvo t.e. hungare. Neatendite ulo malĝentilvorte atentigis ilin, ke ili estas en Rumanio, ili parolu rumane! En la kapon de aliaj pasaĝeroj venis la demando, kio estus, se ili ne estintus lokanoj venintaj ĉi tien, kiel eksterlandaj turistoj, kiuj ne scias alian lingvon kaj oni devigus ilin paroli la rumanan lingvon. Kompreneble ili ne ricevis respondon. Bonvolu diri, kie oni trovas tiom grandan stultaĵon krom Rumanio. Certe ĉiu scias tion, ke en Rumanio la oficiala lingvo estas la rumana. Ĉu ankaŭ en familioj oni devas paroli nur en tiu ĉi lingvo ĉiutage krom la oficejoj? Ĉu ekzistas je tio leĝo? Mi vivas en Hungario ekde 1995. Okazis al mi strangaj aferoj. Multope oni demandis, kie mi ellernis la hungaran lingvon? Mi rememoras en 1998 — tiam kiel rumana civitano — kaj mi estis antaŭ la geedziĝo mi devis vojaĝi al Budapeŝto por peti geedziĝan permeson de la rumana konsulo. Praktike mi bezonis legitimacion por ke mi ne ŝuldas al la rumana ŝtato, mi ne estas geedziĝinta, eĉ eksgeedziĝinta kaj prizorgita familiano. Mi ne ŝatas tiajn aferojn, sed mi trankviligis min, mi estas en Hungario, nenio problemo povos okazi. La unua ŝoko trafis min alveninte al konsulejo. La griza feropordego, la alta barilo ĉirkaŭ la konstruaĵo estis por mi tiel, kiel peceto da Rumanio. La eniro ne estis facila, ĉar starante post longa vico kvarope kontrolante nin oni permesis enpaŝi malgrandan ejon, kie ronde estis giĉetoj. Ĉe ĉiu giĉetoj ekscititaj

paroj tumultis kun siaj dokumentoj. Mi ne sciis, kiel pleniĝi la formularon, sed estis kelkaj, kiuj volonte helpis. Kiam mi finis ĝin, venis sekva surprizo. Certe okazis pro tio, ĉar mi kredis naive en Hungario en la rumana konsulejo oni komunikas hungare kun la klientoj. La virino alparolis min rumane ĉe la giĉeto, tial mi provis kompreni min per mia ioma rumana lingvoscio. Ankaŭ la virino surpriziĝis, ke mi estante rumana civitano apenaŭ mi scias rumane, sed mi klarigis al ŝi, en tiu ĉi lando mi ne havas eblon por ekzerci la lingvon. Tamen ni interkonsentis. Ŝi emis partopreni per sia aĉa hungarlingva scio, reciprokante tion mi ekzercis la rumanan parolon. La dokumentojn ricevis la virino, mi fariĝis malkvieta pro la penso, ke baldaŭe mi renkontiĝos kun la konsulo, kiu subskribos mian geedziĝan permesdokumenton. Anstataŭ tio post la kontrolo kaj mi pagis la petitan sumon la virino subskribis kaj stampis la formularon, dezirante multe da feliĉo ŝi transdonis ĝin al mi tra la giĉeto, poste ŝi entiris la kurtenojn. Estis tagmeze kaj finiĝis la akcepto de la klientoj. Mi fartis feliĉege, mi sukcesis akiri je la unuafojo la permeson. Antaŭ la pordego ankoraŭ la vico estis longa, kiam mi elpaŝis sur la straton. Ili devos enstari la vicon denove alitage. Mi ekmemoris pri la malnovaj tempoj... Estas kio/kiu ne ŝanĝiĝas!

— Tradukis: Apáti Kovács Béla —



# Poezio

Ĉu vi legas ĉiutage verson? Kvazaŭ en la dudekuna jarcento oni ne legus ĝin. Anstataŭ poezio oni prefere rigardas filmojn aŭ iras al drinkejo.

Laŭ mi bona verso helpas en la ĉiutaga vivo por solvi la problemojn.

La versoj flugigas vin al nekonataj regionoj al la lando de fantazio.

Ne hontu legi versojn kaj ekkoni vian nacian poezion. Krome neniam forgesu, la kono de la mondliteraturo estas ligilo inter diverslingvaj popoloj.

Esperanto povas helpi ankaŭ en ĝi.

Do, legu ĉiutage versojn!

## Nikolao Hohlov

### Eŭropo

El nekonataj, ŝlimaj abismoj de l' animo  
Mi aŭdas strangan bruon, en malgraŭvola timo,  
Ĝin trapenetas krioj, kaŝitaj dum miljaroj,  
Grincado de la dentoj, metalo de fanfaroj,

En ĝi stertoras veoj, lamentas ploristinoj,  
Tamburas ŝmacajn hakojn falintaj gilotinoj,  
Susuron flirtas flustre truita silk' standarda  
Kaj ĉion fonas kraka, reeĥa boj' bombarda...

Analojn, postlasitajn de gentoj kaj prauloj,  
Mi sentas en angoro tra tempoj kaj nebuloj,  
Antikvaj krimoj pete al mi etendas manojn  
Kaj forgesitaj lingvoj malbenas la tiranojn,

Haladzon spiras bruta, mensoga kaj maldanka  
La tuta historio de mia raso blanka,  
Nur kelkaj epizodoj, nur kelkaj bravaj voĉoj  
Surlumas tiun muĝon de l' murdaj sangdiboĉoj,

En ili ĝermas savo, en ili – la lumturoj,  
Pro ili solaj palas vizio de l' teruroj,  
Nur sur iliaj ŝultroj atlantaj de l' kelkopo  
Sekure kuŝas sorto de l' krimulin' Eŭropo.

Nur pro ilia sango, oferoj kaj ĉagreno  
Retrovas la honoron la pala Magdaleno,  
Por naski novan idon, en la feliĉaj larmoj,  
Mesion liberigan de la katenaj armoj...

Aŭskultu do, Azio, mamnutristino nia,  
Afriko sfinkse muta, tribar' Oceania,  
Ĝemela kontinento de l' ambaŭ Amerikoj,  
Kunfratoj de l' estonto kaj dumaj malamikoj.

Aŭskultu kaj konfidu la jam proksiman horon,  
En kiu nova sango trafluos nian koron;  
Ankoraŭ kelkaj limoj, hezitoj kaj decidoj –  
Kaj kun la mirtaj branĉoj pilgrimos blankaj idoj,

Kuraci viajn vundojn kaj super la cikatroj  
Trasenti la hontigan brutecon de la patroj,  
Starigi novan mondon de l' paco kaj libero,  
Proklami la Laboron reĝino de la tero...

Tempestas la mistikaj abismoj de l' animo,  
Sed jam vidiĝas lumo en nova malproksimo;  
Obee donas vojon laciĝo kaj miopo  
Al kredo de l' estonto de la patrin' – Eŭropo.

## Eŭgeno Belonenko

### Demando

*paper' de montaro ĉifitas...*

*F. G. Lorca*

Montaro – ĉifita folio  
Kun la skribaj' rivera.  
Kion provkantis dio –  
Diru do, aglo klera?



# Por infanoj



## La fileto de la la malriĉa homo

Iam antaŭ multaj jaroj en malgranda vilaĝo vivis tre malriĉa homo kun sia edzino. Ili havis malgrandan filon Peĉjon.

Lia patro ĉiutage iris por labori. Dume la knabeto restis hejme kun sia panjo.

La virino kuiris, purigis la domon kaj bredi la kelkajn dombestojn.

Vane ili klopodis, mono ĉiam mankis el sia monujo. Ofte ili devis malsati.

Komence Peĉjo malgaje toleris la malriĉecon, sed en iu tagol li enuis ĝin, kaj diris al sia patrino.

— Panjo mia, mi ne povas elteni tiun ĉi malbonan vivon. Faru al mi kelkajn kukojn por ke mi povu ekiri al la mondo.

La virino vane petis sian filon, ke li restu hejme! Eble lia patro baldaŭe ricevos multe da mono de la grandsinjoro. Lin ŝi ne povis konvinki. Fine ŝi faris kelkajn kukojn kaj larmokule ŝi adiaŭis de Peĉjo.

La knabeto kuraĝe ekiris laŭ la rivereto, kiu fluis preter la vilaĝo.

Li iris senhalte tage kaj nokte tri tagojn. Kiam pasis ankaŭ la tria tagol li alvenis la domon de tre maljuna avineto.

Li dece salutis la maljunulinon:

— Bonan tagon, avinjo!

— Bonŝance, ke vi salutis min dece. Sciu, mi estas la patrino de la sepkapa drako. Mia filo forestas. Se li estus hejme, li tuj murdus vin. Mi proponas, fulmrapide forlasu mian domon kaj neniam revenu ĉi tiem!

La knabeto estis ege laca. Li ne povis iri plu kaj li komencis petegi al la avinjo:

— Kara avinjo, almenaŭ ĉi nokton permesu al mi resti en la domo. Mi estas ege laca. Mi ne povas iri sen ripozo.

La maljunulino kompatis Peĉjon.

— Bone – ŝi diris milde – vi povas resti en la domo. Mia filo venos hejmen nur morgaŭ tagmeze. Li forestas rabi reĝidinon. Sciu, li deziras edziĝi kaj elektis belegan reĝidinon el la proksima fortikaĵo. Kaŝiĝu en la kamero, tie vi trovos kuŝejon kun kovrilo. Sed mi atentigas vin al neniu menciu, ke vi tranoktis en la domo de la sepkapa drako. Se tion mia filo ekscios, vin kaj vian tutan familion li murdos.

Peĉjo promesis, kel li silentos kaj al neniu parolos pri la domo de la sepkapa drako.

En la kamero li tuj endormiĝis.

Ĉio estintus en dormo, se la sepkapa drako ne venus hejmen pli frue.

Li jam frumatene alvenis tre, tre furioze. Li diris flagrante en la aero:

— Mi sentas la odoron de homo. Patrino, kiu kaŝiĝas en la domo?

— Neniu filo mia. Eble vi sentas la odoron de ĉasisto, kiu ĉasadis en la proksima arbaro. Diru al mi, kara filo mia, ĉu vi sukcesis forrabi la reĝidinon? – demandis la maljunulino.

— Mi renversis la tutan fortikaĵon. La belega reĝidino malaperis. Mi ultimatis al ŝia patro kaj patrino, post tri tagoj mi reiros, ĝis tiam ŝi reaperu, ĉar, se ne, tiam mi murdos ĉiun.

— daŭrigota —



# Kosmo

# Kosmo

